

Rektmetoda Esperanto–instruado en Koreio

D-ro Markus Gabor / Hungario



– SENFINA HISTORIO –

“En la mezepoko reĝo havis sekretan amatinon kaj tiu virino tre plaĉis al li. Pro tio li volis donaci valoraĵon al sia amatino. Do li ŝtelis valorajn orajn braceletojn de la reĝino kaj sekrete li donacis ilin al la amatino. La reĝo pensis, ke la reĝino havis tro multajn valoraĵojn kaj pro tio ŝi ne rimarkos, ke siaj braceletoj malaperis.

Post kelkaj semajnoj teatra grupo alvenis al la urbo. La teatra programo ŝajnis esti interesa kaj ĝin ankaŭ la reĝo ĉeestis kun la reĝino en speciala loĝio kune kun multaj civitanoj de la urbo. Ankaŭ la amatino ĉeestis en alia loĝio kune kun siaj geamikoj. La amatino estis tro fanfaronula persono kaj ŝi volis montri al la publiko, ke ŝi havas tre belajn kaj valorajn orajn braceletojn. Pro tio dum la tuta teatra prezentado ŝi konservis siajn manojn en speciala pozicio, por ke ĉiuj homoj vidu siajn valoraĵojn.

Post la unua parto de la teatra programo okazis paŭzo. Dum la paŭzo nekonata homo iris al la loĝio de la amatino, kiu havis uniformon de reĝaj korpogardistoj. Li dece salutis ŝin kaj diris, ke la reĝino interesiĝis pri la valoraj braceletoj, kiujn ŝi havis. Samtempe li petis, ke la virino donu al li unu el la valoraĵoj por montri ĝin al la reĝino.

La virino kun ĝojo aŭdis tiun novaĵon kaj ŝi donis unu el la braceletoj al la korpogardisto. Sekrete ŝi esperis, ke la reĝino invitos ŝin al la

reĝa kortego por amike babiladi kaj tiel ŝi havos ŝancon aperi en la alta socio de aristokratoj. Ŝi ne volis resti nur sekreta amatino de la reĝo sed ŝi sopiris aperi ankaŭ en kompanio de altrangaj eminentuloj.

Poste la teatra programo daŭris kaj okazis la dua paŭzo. Dum la dua paŭzo alia homo iris al la loĝio de la amatino. Li havis nenian uniformon, tamen li anoncis, ke li estas la estro de la urba policoficejo. Li raportis, ke antaŭ minutoj policistoj arestis homon, kiu havis similan braceleton, kiun la virino havis. Post mallonga demandado la homo konfesis, ke li ŝtelis la braceleton de nekonata virino en la teatro. Pro tio la policisto petis, ke la virino donu al li la duan braceleton, por ke ili povu kompari la braceletojn. Do, la virino donis la duan braceleton al la homo, kiu rapide foriris.”

Tio estas la unua parto de amuza historio, sed estas demando: Kio povas esti la fino? Dum la unua leciono de mia parolkapablo–evoluiga kurso por la membroj de Seula Filio de Korea Esperanto–Asocio, mi donis la taskon al la



Universitata domo, kie lingvoedukado okazas

partoprenantoj, ke ili skribu la alian parton de la historio laŭ siaj ideoj.

Kiam mi estis juna studento en Eŭropo, tiam nia instruisto instruis la anglan lingvon al ni per similaj metodoj. Do, li rakontis al ni historiojn kaj ni devis konkludi, kio povus esti la fino de la historio. Poste ĉiuj ĉeestantoj resumis la historion, kaj demandis unu la alian pri la diskutita temo kaj fine ĉiuj parolis pri la eventualaj konkludoj. Je la fino de la leciono la ĉeestantoj elektis, kiu el la historiofinoj plaĉis al ili kaj kiu el ili estis la plej amuza.

Mi uzas la saman paroligan instrumentodon ankaŭ en Indramang Universitato, kie mi instruas la internacian lingvon al komencantoj. En la jaro 2014 Silsangsa, la milducentjaraĝa fama budhisma monaĥejo, fondis novan universitaton kun la nomo Indramang Daehak en bela arbara loko sur la pinto de unu el la montetoj de Jirisan¹⁾. La estraro de la universitato akceptis, ke ankaŭ Esperanto, la facile lernebla neŭtrala lingvo de internacia amikeco kaj paco, estu instruata en la universitato. Oni petis, ke mi estu unu el la unuaj profesoroj en la nove fondita universitato kaj tiel mi havis la eblecon instrui la internacian lingvon por la unuaj studentoj.

Antaŭe mi faris doktoran programon en japana universitato kaj multfoje prelegis en diversaj japanaj, ĉinaj kaj koreaj sciencaj kaj kulturaj organizoj kaj multfoje spertis, ke en Orienta Azio plejmulto de la loĝantaro malbone parolas la anglan lingvon. Malgraŭ la fakto, ke en ĉiuj landoj la studentoj lernas tiun lingvon dum multaj jaroj. Okazis al mi, ke en japana stacidomo oni ne povis diri al mi en angla lingvo kiam mi povos kapti trajnon kaj en la bushaltejo de Silsangsa koreoj



Studentoj de la universitata esperantista komunumo

ne komprenis kiam mi demandis tre simplan demandon “*Where is Silsangsa?*” (*Kie estas Silsangsa?*)

Por plibonigi tiun situacion mi havis la celon montri al la korea socio, ke per efika metodo certe eblas ellerni la internacian lingvon dum du aŭ tri monatoj. En lingvoinstruado estas du instrumentodoj kaj ambaŭ havas avantaĝojn kaj ankaŭ malavantaĝojn. Kiam oni instruas fremdan lingvon por koreaj studentoj en korea lingvo, tiam certe estas la avantaĝo, ke la studentoj bone komprenas ĉiujn klarigojn. Sed malavantaĝo estas, ke eĉ post multjara lernado ili ne povas paroli en la fremda lingvo, ĉar mankas la praktika uzado de la fremda lingvo al ili. Do, povas okazi, ke en korea lingvo ili facile kaj bone povas paroli pri la gramatiko de la lernita fremda lingvo, sed en la fremda lingvo ili ne kapablas flue paroli.

Kiam oni instruas fremdan lingvon por koreoj per rekta metodo, tiam la instruisto ĉiam parolas nur en fremda lingvo. Avantaĝo de tiu metodo estas, ke la studentoj al kutimiĝas al la fremda lingvo, sed malavantaĝo estas, ke almenaŭ je la komenco ili komprenas preskaŭ nenion el la fremdlingvaj instruoj. Por pliefikigi la instruadon mi uzas specialan parolkapablo-evoluigan instrumentodon, kaj mallonge kaj simple mi uzas

1) Granda monto en suda parto de Koreio.

specialan paroligan metodon. Tio signifas, ke mi uzas la rektan metodon kaj parolas al la studentoj plejparte en Esperanto kaj mi senĉese paroligas ilin en Esperanto.

Por la instruado mi uzas la lernolibron de Stano Marĉek, kiu jam aperis en pli ol dudek lingvoj, inter aliaj, ankaŭ koree. Por pligrandigi la parolkapablon de la studentoj mi verkas pli ol cent hejmtaskojn kaj jam post la tria leciono mi konstatis mirakle bonan rezulton. Tiamaniere la studentoj de Indramang Universitato ĉiutage ripetadis la lernitajn vortojn kaj la gramatikajn regulojn kaj post la tria leciono ili flue parolis pri ilia vivo per simplaj frazoj. 95% de la hejmtaska teksto, kiun la studentoj skribis, estis gramatike ĝustaj.

Informigante pri tiu pedagogia eksperimento mi ricevis invitojn ankaŭ de aliaj altlernejoj kaj universitatoj. Laŭ plano mi instruos Esperanton en *Jungang* virinasupermezlernejo en Busan kaj vizitos ankaŭ la lingvo-kursojn en Wonkwang Universitato en Iksan kaj en Kyunghee Universitato en Seulo kaj Suwon.

La 26-an kaj la 27-an de aprilo mi havis la



Templo, kie oni konservas 1300-jaraĝan Budho-statuon, kiu estas registrita, kiel nacia kultura heredaĵo de Koreio

honoron ĉeesti la Printempan kurson de *Namkang* Esperanto-Lernejo en Chengdo. Mi surpriziĝis sperti, kia bona la etoso en la lernejo estis kaj kiel amike la partoprenantoj helpis unu la alian. Tridek personoj aliĝis al la evento kaj inter ili estis kvar alilandanoj. Ili estis Ago Feitosa el Aŭstralio, Fujimoto Hideko el Japanio, **Miŝa** el Rusio kaj mi el Hungario. Por ni, alilandanoj estis bona sperto vidi, ke ne nur la veteranoj de nia movado, sed ankaŭ la komencantoj bone kaj flue parolis en la internacia lingvo, do ni facile povis komunikadi dum la programoj.

Speciale interesa por mi estis la prelego de Lee Jungkee²⁾ pri sia vojaĝo en Irano. Bedaŭrinde nuntempe mankas informoj de tiu ekzotika lando, sed laŭ la vortoj de la preleganto ni kun ĝojo konstatis, ke ankaŭ en tiu lando estas forta kaj bone funkcia Esperanto-movado. Rigardante la belajn fotojn kaj aŭskultante la kuraĝigajn vortojn de Lee Jungkee ankaŭ mi decidis, ke iam en la estonto mi vizitos Esperantan Kongreson en Irano.

Nepre menciindas, ke la manĝaĵoj en Namkang Lernejo estis ne nur bongustaj, sed ankaŭ riĉaj kaj altvaloraj. La kruda fiŝo kun la speciale bongusta pika saŭco estas neforgesebla. La duan tagon kun kelkaj ĉeestantoj mi havis la honoron por viziti luksan tradician tedomon en la proksima urbeto, kie d-ro PARK Wha-Chong, la antaŭa prezidanto de KEA, regalis nin per bongustaj trinkaĵoj kaj glaciaĵoj. Tiamaniere ni povis ĝui ne nur la programon de Namkang Esperanto-Lernejo, sed samtempe povis informiĝi ankaŭ pri la riĉa korea kultura heredaĵo kaj sperti kiel riĉaj koreoj povas agrable pasigi tempon en luksa terestoracio.

2) UEA-estranano, eksprez. de KEA, prez. de SEK (Seula Esperanto-Kulturcento)

Mi komencis mian raporton per la senfina historio, do mi ankaŭ finas ĝin per tiu rakonto. Mi bone konstatis, ke ĉiuj kursanoj en la seula paroliga kurso bone komprenis la historion kaj ĉiuj verkis interesajn kaj ideoriĉajn historiofinojn. La plej honesta kaj iom naiva historio venis de Fujimoto Hideko. Ŝi kredis ĉiujn vortojn de la historio, do ŝi kredis, ke la unua vizitanto estis vera reĝa korpogardisto kaj la dua estis vera policoficisto. Ŝi kun ĝojo konstatis, ke la braceletoj ne malaperis sed ŝi havis ankaŭ moralan konkludon. Laŭ ŝi la reĝo ne estis honesta, ĉar li estis riĉa, do li havis sufiĉe da mono por aĉeti valoraĵon al sia amatino. Li tamen ne aĉetis sed ŝtelis posedaĵon de la reĝino, do tio estis certe ne tolerebla maljusta agado.

La historiofino de OH Soonmo estis la plej interesa kaj la plej amuza. Laŭ ŝi ambaŭ homoj, kiuj vizitis la reĝan amatinon, apartenis al la korpogardista organizo de la reĝino. Dum la unua parto de la teatra programo la reĝino vidis la braceletojn ĉirkaŭ la brakoj de la nekonata virino en la teatro kaj rimarkis, ke ili apartenis al ŝi. Ŝi volis ricevi ilin diskrete, sen skandalo. Do ŝi petis siajn korpogardistojn aranĝi la aferon kaj ili solvis la problemon en tiu formo. ☞